



Norvega Esperantisto

ESP ER AN TO B LA DE T

N-ro 1 1967

ORGANO DE NORVEGA ESPERANTISTA LIGO
CHEFREDAKTORO: JOHAN HAMMOND ROSBACH

3-a periodo
33-a (38-a) jaro
Monata

Invito al la Eŭropa Esperanto- kongreso 1967 en Innsbruck, Aŭstrio

Tirola iam nomighis «Lando en la montaro». La malnova nomo trafte karakterizas parton de Aŭstrio. Vehemencan forton radiadas tiu ĉi tipa Alpmontara regiono. Potence ghi klopodas superi chion meznivelan. Je sunleviĝo ekflamas la montpintoj, ardas la montnegho, vaporas la valoj. Dum fulmotondro ektramas la montoj, fulmoj similas al flamomaro, tondrobruo sonas kvazau trumpetej de la lasta jugho. Sed vakanta vivovolo kontraustaras la potencojn: La veterabio ne klinighas, ech se tempesto rompas ghiajn branĉojn. Vere, en Tirola la atmosfero estas plena je eksterordinara forteco! Chi tie oni kuraghighas kaj decidas energie.

Innsbruck, la chefurbo kaj kulturcentro de Tirola, ricevis en la jaro 1965 European Premion. Innsbruck nombras 110 000 enloĝhantojn kaj okupas respektindan rangon inter la plej belaj urboj de Eŭropo. La panoramo de sur la Urba Turo estas grandioza: Malfrugotikaj loĝhdomoj antau la Norda Montoĉeno. Tre proksime, apud la konata Ora Tegmento, situas la iama kortega preĝejo kun la renesancstila mauzoleo de la Lasta Kavaliro, imperiestro Maximilian I. Che la urba periferio staras Kastelo Ambras, richa je artaj trezoroj. Jen. Monto Isel, kie la Tirola nacia heroo Andreas Hofer venkis kontrau Napoleonaĵ armeoj. Apude vi trovas la olimpian skisportejon. Ni memoras al

Toni Sailer, gajninto de pluraj olimpiaĵ premioj. Innsbruck ofertas multajn interesajn ekskurscelojn, ekzemple la gigantan European Ponton de la Brenner-autoshoseo, la lagon Achensee (kun impona vaporshipveturado 1.000 metrojn super marnivelo) au por ni esperantistoj la urbon Wörgl, kie staras Zamenhof-monumento.

La Eŭropa Esperanto-Kongreso 1967 en Innsbruck certe farighos neforgesebla travivajho. Temoj por diskutoj estos la Eŭropa Esperanto-Revuo kaj la Eŭropa Esperanto — Servo Turisma. Bonvolu noti: 23.-30.7. 1967, Innsbruck, renkontejo por aktivuloj kaj por multaj vojaĝhemaj anoj de Esperantujo! Kongreskotizo: 210. — austr. shil., familianoj ghuas rabaton. Alighiloj kaj kongresbultenoj haveblaj che Aŭstria Esperantista Federacio, Fünfhaugasse 16, 1150 Wien, Aŭstrio.

UNESKO KAJ ESPERANTO

Atentu! Kiam ni ricevis la UEA-cirkuleron pri Unesko-novajhoj en decembro, nia gazeto jam estis presita. Sekve nia artikolo sur la frontpagho bedaurinde enhavas detalojn, kiuj ne konformas al tiu cirkulero.

Bonvenon al landa kongreso en Sauda!

Kiel vi jam legis en cirkulero de N.E.L., nia klubo en Sauda invitis al landa kongreso 1967. Ghi okazos pentekoste, la 14 an kaj 15 an de Majo.

Kvankam Sauda estas malgranda loko, ni povas certigi al vi ke ghi estas nepre vizitinda. Precipe bela ghi estas dum la printempa sezono.

Nia klubo promesas fari chion por sukcesiĝi vian restadon en Sauda.

En la venonta numero de «Norvega Espe-

rantisto» aperos artikolo pri nia urbeto, kun bildoj. Ankau detaloj pri la programo de la kongreso aperos, kaj praktikaj informoj pri hotelprezoj k.t.p.

Ghis tiam ni petas vin: rezervu la pentekoston por Sauda, kaj se vi deziras, vi povas jam nun anonci vin al la sekretario de la klubo: Elna Matland, Sauda. La pago estas 10 kronoj.

La klubo estraro en Sauda.

UNESKO

La Ghenerala Konferenco de UNESKO, kiu finighis la 30-an de novembro 1966 en Parizo decidis rekomendi al la Ghenerala Direktoro de UNESKO esplori la eblecojn dum la laborperiodo 1969—1970 per eksperta komisiono studi la bezonon kaj la eblecojn utiligi internacian lingvon apud la naciaj lingvoj por diversaj sferoj de la homa aktiveco. La demandon oficiale levis Danujo, Finnlando, Islando, Norvegujo kaj Svedlando.

Monkolekto al la Informadfondajho de N.E.L.

La 5-kronrulado — Listo 12:

Olaf Nyberg,
Åndalsnes (kr. 10,00)
John Berggren, Oslo (» 5,00) kr. 15,00

Donacoj:
Orienta Distrikto
de N.E.L. kr. 647,56
John Stenström,
Jönköping » 25,00 » 672,56

Sume kr. 687,56

La Financa Komisiono admonas chiujn esperantistojn partopreni la Kronruladon ankau en 1967.

La Financa Komisiono de N.E.L.

Averto al la legantoj

La nova presejo ne posedas la supersignitajn literojn. Oni tuj mendis ilin el Usono, sed la liverado postulis pli longan tempon ol oni supozis. Por eviti plian malfruon la Liga Estraro decidis provizore presigi la unuajn du numerojn per la literkombinoj ch, gh, hh, jh, sh, u por la supersignitaj literoj (kiel Zamenhof proponis por tiaj kazoj). Espereble por n.ro 3 la supersignitaj literoj estos alvenintaj.

Glumarkoj

Sveda Esperanto-Federacio aranghos sian 61-an jarkongreson en la urbo Norrköping pentekoste, 13-an ghis 15-an de majo, 1967.

Ni pretigis reklamglumarkon kiun oni povas mendi che Esperantoklubo de Norrköping, poshtfako 49, Norrköping, Svedujo.

La kosto estas po unu karto je dek markoj du internaciaj respondkuponoj au tri kartoj po kvar kuponoj.

«ESPERANTO EN KOMERCO»
kvinlingva raportaro pri spertoj de 100 firmaoj el 40 landoj. Prezo g.m. 2,—; ekde 10 libroj g. m. 1,35.
Esperanto-Rondo, 718, *Crailsheim*, Germanujo.

Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

Redakcio: Johan Hammond Rosbach,
Hans Amund Rosbach

Adreso de la redakcio: Hulderveien
17 B, Sarpsborg. — (Limdato por manuskriptoj: la 20 en la monato antau la apero.)

Abonprezo: En Norvegujo kaj eksterlando: n. kr. 8,00

Anonprezoj: 1/1 pagho kr. 150,00
1/2 p. kr. 75,00, 1/4 p. kr. 38,00,
1/8 p. kr. 19,00.

NOVA

Noja jaro chiam signifas novajn aferojn. Che la komenco de nova jaro oni ofte pripensas, kion oni faris pasintjare. Kaj oni trovas tion nesuficha. Konklude oni decidas plistrechi siajn fortojn en la nova jaro. Faru tion! Esperanto bezonas vin, same kiel vi bezonas ghin.

Kun la nova jaro ni ankau transiras al nova presejo. Chi tiu numero estas la unua kompostita kaj presita che Østlendingens trykkeri en Elverum, kun kiu ni esperas havi agrablan kunlaboron. La shango de presejo eble montrighos diversmaniere ankau en la gazeto mem.

Ni deziras danki al Haaves Boktrykkeri en Brumunddal, kaj precipe al sinjoro Finn Haave, pro chiu bonvolo kaj pro agrabla kunlaboro dum multaj jaroj. Kiom da shparto de tempo estis ekzemple por la chefredaktoro, ke s-ro Haave povis legi la signojn, kiujn la red. kutimas nomi sia manskribo! Dankon!

Esperanto-klubanoj deziras korespondi kun norvegaj gesamideanoj. Certa respondo estas garantiata.

Adreso: Esperanto-Klubo «Egressy», Budapest, VII., Almási tér 2. Hungario.

SCIIGOJ DE N.E.L.

Norvega Esperantisto. Se vi deziras eviti interrompon en la ricevado de la gazeto, ni varme petas vin bonvolu tuj pagi vian kotizon. — La *rektaj membroj* bonvolu sendi sian kotizon (kr. 20,00) al N.E.L., Boks 942, Oslo 1 (poshtghirokonto 100.30), la *klubanoj* bonvolu tuj pagi sian kotizon al la klubo kasisto. Kaj al la *klubaj kasistoj* ni same varme petas: bonvolu *senprokurate* aktive ekagi por kolekti la kotizojn de la klubanoj, kiuj ankoraŭ ne pagis por 1967, kaj chiuokaze sendi al ni liston kaj kotizojn por la jam pagintaj klubanoj plej malfrue en la unua semajno de Februaro. Antauan dankon!

Subtenantaj membroj. Ni petas chiujn membrojn, kiuj havas okazon por tio, anonci sin kiel subtenantajn membrojn de N.E.L. La kotizo estas kr. 30,00 por unu jaro. Klubano pagas kr. 15,00 aldone al sia klubkotizo.

Apogmembroj. Ni petas chiujn membrojn varbi apogmembrojn (kr. 5,00). Chi tiu kategorio celas neesperantistojn, kiuj estas pretaj apogi nian laboron per malgranda subteno; ili ricevas la jarraporton.

52a Universala Kongreso de Esperanto okazos en Tel-Aviv, Israelo 2.—9. Augusto 1967. Turisma Servo de N.E.L. planas komunan vojaghon, kompreneble kun vizitoj al konataj lokoj en Israelo, kaj lau peto sendas bultenojn kaj alighilojn, kaj akceptas alighojn kaj mendojn. Interesighantoj turnu sin al la Turisma Servo laueble baldau, por ke oni havu ideon pri la interesigho.

Junulara Kongreso okazos en Natanja, Israelo. Interesighantoj skribu al la Turisma Servo de N.E.L. pri informoj.

La kontorfondajho. Ni permesas al ni memorigi pri tiu grava donacfondajho. Chiu donaco estas bona helpo por la ekonomio de N.E.L.

Taskotablo por kluboj. — *Februaro.* La kursgvidanto kontrolas la laboron de la studrondoj kaj klopodas fondi novajn studrondojn. Antau la 15 a la

På norsk

Ungarske språkforskere
for Esperanto

(Budapest:) Over tjuve kjente ungarske språkvitenskapmenn har sluttet seg til henstillingen til FN om å løse språkproblemen i internasjonalt samarbeid ved effektiv støtte til utbredelse av det nøytrale internasjonale språk Esperanto.

Vitenskapsmennene er alle knyttet til det ungarske vitenskapsakademiet institutt for språkvitenskap. Blant dem finner en Geza

sekretario sendas jarraporton pri la pasinta jaro al N.E.L. kaj al la Distrikto (bl. A 11). La kasisto sendas skriban kotizpostulon al chiuj nepagintaj klubanoj, kun plenigita poshtghirokarto au poshtmandato, informante ke post unu monato oni eventuale sendos poshtan enkasigilon. — Estrarkunveno planas la martajn kunvenojn.

Raporto de la Liga Estraro pri la 4a jarkvarono. Okazis unu estrarkunveno, kaj oni dissendis unu cirkuleron al la kluboj kaj rektaj membroj (i.a. pri donacabonoj al Norvega Esperantisto). Char Haaves Boktrykkeri ne plu povas presi nian gazeton, ni akiris interkonsenton kun Østlendingens Trykkeri, Elverum, kiu ekde la nuna numero presas ghin. Oni decidis de nun nomi la landajn kunvenojn Norvegaj Kongresoj (sed norveglingve: landsmøte), kaj fiksas la alighkotizon. Oni diskutis reaktivigon de malfortaj kluboj kaj rekreskigon de la membronombro. La nova turistbroshuro pri Oslo (eldonita de Reisetrafikkforeningen for Oslo) aperis kaj estas dissendita al la Esperanta gazetaro kaj Landaj Asocioj, kaj la distribuadon nun prizorgas Klubo Esperantista en Oslo. Oni planas plivastigon de la reto de Fakdelegitoj de U.E.A., kaj proponis s.ron Nils Utne kiel membron de Provizora Komitato de Tehnikista Internacia Societo de I.S.A.E.

La Liga Estraro.

Barczy, som er ansett som Ungarns fremste språkforsker, Laszlo Galdi, som har utarbeidet alle moderne russisk-ungarske ord-bøker, og Lajos Lörcncze, som hver uke holder foredrag i radioen om ungarsk språk.

Denne tilslutning i Ungarn kommer som et ekko til tilslutningen fra en rekke amerikanske språkforskere og andre vitenskapsmenn som nylig underskrev henvendelsen til FN. Det blir meldt at henvendelsen også er undertegnet av fremtredende ungarske politikere, deriblant justisministeren, arbeidsministeren, ministeren for lettindustrien og Sándór Barcs, som er medlem av den ungarske republikks presidium og i utlandet er mest kjent som nestformann i det europeiske fotballforbund.

Henvendelsen skal overleveres FN's sekretariat i oktober. Inntil midt i mai hadde den fått over 775 000 underskrifter. Dessuten har den fått tilslutning av omkring 3 000 organisasjoner med i alt 61 millioner medlemmer.

Suksess for beretning om Esperanto-reise

(Tokio:) Da Kyotaro Deguci begynte å lære Esperanto i 1960, ante han vel ikke at dette skulle føre til førsteplassen i japanske avisers bokbarometer «Ukens mest solgte bok». I flere måneder etter at «Min reise i Esperantoland» kom ut, har den 29 år gamle forfatteren hatt denne førsteplassen. Boka har passert 50 000 i opplagstall, og nye opplag forberedes. Den forteller om en reise jorden rundt som Deguci gjorde i 1963 sammen med en kamerat. Over alt benyttet de to det internasjonale språket som de nettopp hadde lært. De ble bedt hjem til esperantister, holdt foredrag i Esperanto-klubber og var med på Esperantokongresser. Siden reiseberetningen kom ut på ett av de største forlag, Achai Shinbun, har Deguci fått over 3 000 brev fra begeistrede lesere.

Britisk Esperantofjubileum

(Norwich:) Esperantister fra alle kanter av Storbritannia var samlet i Norwich da British Esperanto Association åpnet sin femtiende kongress. Byens myndigheter hadde gjort sitt til å gi byen preg av jubileet ved å heise Esperanto-flagg på rådhuset, på Norwich Castle og på andre offentlige bygninger. Lord Mayor og trafikkrådmannen foretok høytidelig avduking av gateskiltene for

Kongresvojagho

Oni laboradis por aranghi flugkaravanon por skandinavianoj la 52-a U.K. en Tel Aviv je favora prezo kaj kun interesa programo. En chi tiuj tagoj alvenis de la Kongresvojagha sekcio de Centra Dana Esp. Ligo jenan planon, kiun ni varme rekomendas:

Sabate la 29/7 foriro de Kopenhago, alveno en Tel Aviv vespere. Flugdauro 7 horojn.

Dum la tagoj antau la kongreso oni faros rondvojaghon en Tel Aviv, kaj tuttagajn ekskursojn al Nazaret, Lago de Galileo, Jerusalemo kaj viziton en kibuto.

De la 2-a ghis la 9-a de agosto: partopreno en la kongreso.

La 11-an de agosto: revojagho al Kopenhago per flugmashino kun alveno vespere.

Dum la tuta restado en Israelo la partoprenantoj en la karavano loghos en bela, nova hotelo en distanco de 15 minutoj de la centro de Tel Aviv. Dulitaj chambroj kun propra dushbano, necesoj kaj telefono.

La tuta arango: flugvojagho Kopenhago — Tel Aviv tien/reen, hotelrestado kun matenmangho kaj ekskursoj en la tagoj antau la kongreso kostos d. kr. 1 900,00.

Ori atentigas, ke pro certaj cirkonstancoj — precipe la loghiga problemo — estas absolute necese tuja aligho al la kongreso kaj al la partopreno en la flugvojagho. Plej lasta alighdato por la flugvojagho estas la 15-a de aprilo 1967.

U.E.A. aranghos du postkongresajn ekskursojn de la 10-a ghis la 13-a de aug.

1.: al Negev (Beerseba, Morta Maro k.a.)

2.: al Galileo (Nazareto, Tiberio, k.a.)

kaj postkongresan rondvojaghon de la 9-a ghis la 20 de aug. tra Israelo. Ghi inkluzivos Beerseba kun kamelfoiro, vizitojn al la ku-

en ny gate «Esperanto way», som begynner ved rådhuset.

Blant deltakerne i kongressen var representanter for Esperantoforbundene i en rekke land, blant andre Norge. I festtalen understreket presidenten i verdensforbundet, professor Ivo Lapenna, den sterke stillingen Esperanto har i Storbritannia, og den store innsatsen fra britisk side i Esperanto-litteraturen og i verdensforbundets arbeid.

prominoj de Timna kaj al la kolonoj de Regho Salomono, al Eilat, al Jerusalemo, al la Morta Maro, al Haifa, al la araba urbo, Akko, al Sfad, al la Lago de Tiberio kaj al la urbo Natanja por kelktaga ripozo en belega banloko. Klimatizitaj autobuso, kompleta prizorgo dumvoje, komfortaj hoteloj, chiuj manghoj kaj servmono inkluzivitaj. Prezo 560 guldenoj.

Partoprenantoj en la skandinavia flugvojagho devas aparte atentigi chu ili deziras partopreni en la postkongresaj aranghoj de U.E.A. kaj mencii kiun daton ili deziras reiri al Kopenhago.

Chiujn detalajn informojn vi ricevos che Turisma Servo de N.E.L.

Box 942

Oslo 1.

Norvegaj impresoj

„Milmejla vojo komencighas per la unna paso” - china

Dum pluveta autuna tago post elpramigho en Trelleborg, la fidela geduo- mia flava autochevalo kaj mi, malforta virino, ekigis la daureman ambлон por forigi la nebagatelanan mejlo-distancon kiu min ankoraŭ disigas de la sopirata vivorevo: Norvegujo.

Al kelkiuj povas shajni iom ekzalte troigita mia sopiro; pli naturkonformas, ech pli konvenas revii pri la suna Italujo, mirinda Hispanujo, dolcha Francujo au plena da antikvaj rememoroj Grekujo. Mi tamen chiam sopiris je Nordlando, la mita azilo de chiuj miaj pensoj.

Nun venis tempo kiam mia vivoromano povas ricevi la lastan chapitron, do mi stretchis la fortojn por ke la dumviva revo ighu realajo, ke la palpebroj kovru miajn pupilojn saturigitaj per realaj bildoj, kaj domu trankvile la senvekan dormon.

La distanco iom post iom malgrandighas, ankau la pluveto chesis. De la chielazuro la suna lustro nun maloportunas kaj blindigas la sciavidajn okulojn. Sed la rando de la autovojo ekincendias en orgojla akra flaveco. Orumas, ensorchas, pavas en nepriskribbla kolorpimpo la chevojaj arboj. Ho Dio kompatema, kiel vi ne malfermas la homajn ani-

mojn, ke ili scipovu ghui la efemeran belecon de la oktobra miraklo?!

Mi sentas min iel honta pri miaj admiro kaj ghuekkrioj elvokitaj fare de tiu chi belajho iom tro granda ol mia modesta soifo . . . Kvazau antau sia respegulita bildo Margareta, alprovanta de la d-ro Faust donacitajn juvelojn, mi demandas min fojfoje: «chu estas vi, Danuta? Chu vere estas vi?!». Mi estis tro fascinita por esprimi alion ol nur ghojon stultan kaj profundan. Autuno teksas la tapishon susurantan sub miaj piedoj, la dibocha abundo de la lagoj oferas disipe al mi sian juvelan richecon. En la viola antauespera krepusko de la forpasanta tago, la marrita blublua akvosurfaco enkadrigita per rokokaj shtonegoj invaditaj fare de la konkerema vegetajharo kaj fortikaj arboj, naskis en mi ghis nun nekonatajn pensojn, kiuj solvigis en komplezema nokto.

La nigreblua chielo sternas sian veluran tukon super mi. Sub la lumo de la neatingeblaj silentaj steloj, briletantaj senlace, miaj amare spertitaj kompatindaj veroj pri avida deziro je la felicho, febra amo, trompita fideleco kaj malespero, dumtage mallumigantaj min per sia turpa nedeco, nun malaperis; la steloj eksentigas al mi la tushon de la eternaj Fingroj, alportantaj serenajn pacon en la koron. Mi sentis kvazau miaj poroj ekkreskigu milon da delikataj sentiloj, kiuj ensorbis, ensuchas la noktajn trankvilon kaj kvietigas, ghis mi enfalas en domon sensonghan . . . Chu la homa animo devas esti elcherpita pere de la sentumoj?!

La nova tago debutas en blankkolora brilo de la frosta matenfruo en Østerdalen. La valon ankoraŭ ombrigas la minaca chirkaubrako de la montaro. Ghi jam elmergigas sian majestatan potencon, sed la rokeca silento letargias nevekebla.

Komencighas por mi la unua mateno sur la norvega tero. Ghis nun la sorchajhojn de mia kapo kaj animo pri la pejzagho Nordlanda mirinde kompletigis la realaj bildoj; la naturo ne trompis min. Chu la homo apartenanta al tiu chi feroce bela lando ne sobrigos min?

Nur kelkdekojn da metroj ankoraŭ silentas domo de mia anima amiko, nekonata en sia fizika formo. Ankoraŭ dormas en dimancha trankvilo la haveno por mia laceco, la shelo kovranta miajn esperojn, revojn pri fidela amikeco, justa veramo, kerno de la homa interrilato.

Se ni ambau kontentigos chiajn m'ajn imagojn pri ni mem, chu la disigho baldaŭ kaj malfacila reveno ne tro dolorigos min? Jes ja, mi scias, en chiuj interhomaj rilatoj kushas doloro kiun ni suferigas, kaj doloro kiun oni suferigas al ni. Kiel stulta mi estis, ke mi timis la solecon!

Sed se ni ambau disiluziighos? Nu, mi sobrighos post la ensorcho: Cetere neniam malfelicho, ech pli, tio chi estas normala aperajho en la vivo, kaj mi estas prudenta homo, do mi scipovas alghustighi. Sed chiam restos en mia memoro la bildo pri majesta trankvilo de la montopintoj, pri la matena ensonghigo de la valo, pri la kviete fluantaj Gloma-akvoj kun sorche gracia ponteto, delikata kvazau rompebla ludilo de l'infano, pri la invita grizverdeta moleco de muskoj, kie miaj rigidaj kruoj de la vivpilgrimo eksentis la refreshigan kareson de la roso.

Tenera venteto petole malordigas miajn harojn; la lasta malpacienca manmovo glatiganta kaj mi eniras la domon!

«Kjell!» «Danuta!»

Ho, Kjell-amiko, chu eblis tiom da felicho renkonti en la vivo!!!

*Danuta Kubiak,
Starachowice, Polujo.*

La usona lunprogramo

NASA nun decidis utiligi *rendevuon* en lunorbito por surlunigi la unuajn amerikanojn sur la naturan sateliton de la tero komence de 1968. Tio signifas ke la *Apollo*-spacilo entenu komando-sekcion (peco ca 4,5 tunoj), servosekcion (ca 20 tunoj) kaj lunsurighilon (ca 10 tunoj). La elpafo okazos per portoraketo de tipo «*Saturn 5*», kaj kiam *Apollo* forlasis la enparkigan orbiton kun kurso por la luno, la «lunighilo» (LEM) (Lun-Ekskursiva Modulo) estos instalita che aerkluzo en la pinto de la komandosekcio. Post iom pli ol 60 horoj oni estos che la luno, kaj tie eniros en 150 km altan cirklorbiton. Du el la anaro de 3 viroj grimpos en la lunighilon, kiu poste estos liberigita, bremsigita kaj mole surlunigita. La preskau vertikala surlunigho okazos de elira alteco de 30 m. La du astronautoj tiam povos eliri por fari sciencajn esplorojn.

UNESKO-seminario pri turismo kaj sporto diskutas pri Esperanto

De la 13-a ghis la 16-a de oktobro 1966 okazis en Bled, Jugoslavio, la Unua Internacia Seminario pri Turismo kaj Sporto, sub la auspicio de UNESKO. Tiun seminarion partoprenis 104 delegitoj el 14 landoj. Inter ili, kiel plenrajta membro partoprenis la Internacia Instituto por Oficialigo de Esperanto (IOE), reprezentita de sia direktoro, Lic. Tibor Sekelj.

La temo de tiu Seminario estis la alproksimigo de la du plej amasaj aktivadoj de nia jarcento, turismo kaj sporto, kaj ilia pli bona profitigo por la tuthoma alproksimigho. La raportoj do, envolvis tri problemojn. Unue, kiel doni al la turistoj pli da korpa aktivado, pli da sporto. Due, kiel al tiuj, kiuj vojaghas por partopreni au cheesti sportajn eventojn, proponi ankaŭ turisman kaj kulturalan enhavon al la vojagho. Trie, kiel atingi ke ambau aktivadoj kontribuu laueble plej multe al la reciproka interkonatigho kaj amikigho de la popoloj, kaj al la kultura kaj socia integriĝo de la homaro.

La reprezentanto de IOE prezentis raporton kiu koncernis tiun chi klopodon, kaj proponis la laugradan adopton de Esperanto en la turismo kaj sporto, la sole ebla vojo por atingi vastan komunikighon inter la diverslandanoj kaj kulturalan kaj socian integriĝon. La raportoj estis favore akceptita de la partoprenantoj, kiel ankaŭ de la jhusele-

Che la revojagho oni uzos parton de la lunighilo kiel startplatformon, kaj faros *rendevuon* kun la resto de *Apollo*, kiu intertempe orbitis chirkaŭ la luno. La du viroj engrimpos en la komando-sekcion, la resto de la lunsurighilo postlasighos en la cirkla orbito, kaj helpe de raketmotoro malantaŭe en la servo-sekcio oni direktighos kontraŭ la tero.

La reven-fazo de la lunvojagho komencighos per tio, ke la komando-kaj servosekcio estos disigitaj ca 4600 km de la tero. Post la turnigho la komando-sekcio renkontos la atmosferon cha 120 km super la okcidenta Pacifiko, kaj la surterigho okazos en la orienta Pacifiko post kiam falshirmiloj reduktis la vertikalan rapidon ghis 7,6 m/sek.

ktita internacia komitato por la daurigo de la klopodoj de tiu chi unua seminario.

Siaflanke IOE ellaboras vastan planon por tutmonda agado, por profiti la tre favorajn cirkonstancojn, kaj enkonduki Esperanton en la turisman kaj sporton. Tio estas atingebla, kompreneble, nur se ni sukcesas mobilizi chiujn aktivajn fortojn al la sama celo. Ni memorigas ke la jaro 1967 estas proklamito la Internacia jaro de la Turismo, sub la slogano Turismo — pasporto al la paco. Jen slogano por ni:

*Turismo — Pasporto al la Paco,
Esperanto — Pasporto al la
interkomprenigho.*

UNESKO- novajhoj

*Norvegujo kumbatalas kontraŭ
Afrika analfabeteco*

En Norvegujo estos eldonita per financa helpo de la Fondajho Dag Hammarskjöld elementa bildolibro en la suahila lingvo por plenaghaj analfabetoj.

La lernolibro, kiu titolighos «La Daglibro», havos tekston parte ankaŭ en la angla. Ghi konsistos el du partoj, kun kolorilustrajhoj de afrika artisto. La unua parto estos elementa vortaro, en kiu chiu pagho montros ses chiutagajn objektojn kun, apude, la respondaj suahilaj vortoj; la dua enhavos tutpaghajn desegnajhojn pri facile rekoneblaj situacioj el la afrika vivo, sub kiuj aperos simplaj frazoj au vorto-grupoj.

Provizore oni distribuos limigitan eldonon de 5 000 ekzempleroj en Tanzanio. Lau la plano aperos poste eldonoj en aliaj afrikaj lingvoj. (Lau Unesco Features kaj Informa Servo de UEA).

52-a Universala Kongreso de Esperanto Tel Aviv, 2-9 Augusto 1967

Alia Protektanto: Zalman Shazar, Shtat-prezidanto de Israelo Konstanta Adreso: Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando.

Honora Komitato. Ghis la nuna momento akceptis eniri en la Honoran Komitaton de la Kongreso: Kadish Luz, Prezidanto de la Parlamento; David Hakohen, Prezidanto de la Komisiono por Eksterlandaj kaj Sekurecaj Aferoj; Eliahu Ejlal, Prezidanto de la Hebrea Universitato en Jerusalemo; Abraham Shlonski, Poeto.

Postmarko. Okaze de la Kongreso, la Israela Ministerio pri Poshtaj Aferoj decidis eldoni specialan memorigan poshtmarkon. Detaloj sekvas en venontaj komunikoj.

Ekskursoj. La Loka Kongresa Komitato decidis okazigi dum la Kongreso du tuttagajn ekskursojn: al Jerusalemo kaj al Nazareto. La ekskurso okazos samtempe dimanchon la 6-an de aug. 1967.

Post la Kongreso okazos du tritagaj ekskursoj: al Negev (Beersheva, Morta Maro, k.a.) kaj al Galileo (Nazareto, Tiberio, k.a.). Ambaŭ ekskursoj okazos samtempe de la 10-a ghis la 13-a de aug. 1967.

Organizita de la Centra Oficejo de USA, post la Kongreso okazos 10-taga ekskurso tra Israelo, de la 9-a de aug., posttagmeze, ghis la 20-a de aug., matene 1967.

Detaloj pri ĉiuj ekskursoj sekvas en venontaj komunikoj kaj en la Dua Bulteno.

Loghado. Por loghado dum la Kongreso estos la ebleco elekti inter pluraj kategorioj de hoteloj, kies prezoj varias de ch. 8, = ned. gld. (komuna loghejo) ghis 60, = ned. gld. (luksa hotelo) potage. Estos ankaŭ la ebleco loghi en Junulara Gastejo, kelkajn kilometrojn ekster Tel Aviv, je la prezo de

Unua Internacia Foiro de Azio

La Unua Internacia Foiro de Azio okazos de 17 novembro ghis 10 decembro en Bangkok sub auspicio de la Ekonomia Komisiono de Unuighintaj Nacioj por Ekstrem-Oriento (ECAFE). (Lau Unesco Features kaj Informa Servo de UEA).

ch. 7, = ned.gld. po persono en dulita chambro. La supre indikitaj prezoj inkluzivas dormon kaj matenmanĝon.

Detaloj sekvas en venontaj komunikoj kaj en la Dua Bulteno.

Char LKK povos akcepti mendojn por loghado nur ghis la komenco de majo 1967, estas nepre konsilinda tuja aligo al la Universala Kongreso por ricevi ghistatempe la Duan Bultenon, en kiu troviĝas la mendilo por loghado, *la sola dokumento valida por rezervi dormlokon dum la Kongreso.*

Novaj kotizoj. Ekde 1. 1. 1967 validas la jenaj alighkotizoj:

Kongr.	77,=	ned.gld.	(308	steloj)	
Edz.	38,50	»	»	(154	»
Jun.	24,=	»	»	(96,=	»
Stud.	38,=	»	»	(152,=	»
Blind.	31,=	»	»	(124,=	»

Unua Bulteno kaj Alighilo estas riceveblaj che la Konstanta Adreso de la Kongreso kaj che la diversaj Landaj Asocioj.

Statistiko ghis la 12. 12. 1966. Arg. 1, Austral. 3, Austr. 4, Belg. 7, Braz. 2, Brit. 24, Bulg. 26, Chehh. 16, Danl. 3, Finnl. 3, Franc. 67, Germ. 10, Hisp. 3, Hongkongo 1, Hung. 36, Isr. 30, Ital. 15, Jap. 3, Jug. 20, Kan. 1, Mon. 3, Ned. 27, Norv. 4, NovZel. 1, Poll. 86, Port. 2, Rum. 1, Sovjet. 1, Sved. 17, Svis. 5, Usono 10, Venez. 1, Entute 433 el 32 landoj.

Karavanestro serchata

kiu gvidos samideanaron al la EUROPA ESPERANTO-KONGRESO 1967 en INNSBRUCK.

Interesitoj skribu al:

Austria Esperantista Federacio, Fünfhausgasse 16 1150, Wien, Austrio.

RECENZOJ

Turistbroŝuro pri Oslo

Jam la sesan fojon la Turistrafika Asocio de Oslo kaj Chirkauajho eldonis turistbroŝuron en Esperanto. La broŝuro prezentighas kiel faldprospekto ilustrita, en la koloroj nigra kaj verda.

Oni povas en ĉi tiu broŝuro legi mallongan geografian orientigon pri la chefurbo, kaj pli detale pri la vidindajhoj. Efektive la vidindajhoj okupas la duonon de la broŝuro, kaj estas ordigitaj geografie sub la titoloj Bygdøy, Urbocentro, Okcidentaj Urbopartoj, Orientaj Urbopartoj. Cetero estas ankaŭ informoj pri rondeveturoj kaj pri tuttagaj ekskursoj, pri restoracioj kaj loghado.

Car la Turistrafika Asocio de Oslo kaj Chirkauajho estis ĉiam favora al Esperanto — sed ja ne nur tial — oni bolvolu mendi la broŝuron, kiu estas senpage ricevebla che Klubo Esperantista en Oslo, Boks 942, Oslo 1. Sed bonvolu sendi respondkuponon por la afranko — por unu respondkuponon oni povas sendi maksimume 12 ekzemplerojn. JHR.

Pri Zamenhof par infanoj

Gösta Henriksson: «El la vivo de Ludoviko Zamenhof». Eldona Societo Esperanto, Malmö 1964.

16-pagha kajero verkita por infanoj kaj junuloj pri la infaneco de Zamenhof en Bjalistoko, pri la studentaj jaroj en Varsovio kaj pri la «Doktoro Esperanto», — do pri la evoluo ghis eldono de nia lingvo.

Per simplaj frazoj Henriksson redonas la al esperantistoj tiel konatan rakonton, por ke ankaŭ novaj generacioj ekkonu ghin.

Homa dokumento

Teodoro S. Shvarc: «Maskerado chirkau la morto». Stafeto 1965. 250-pagha.

La aŭtoro estas — al pli malnovaj esperantistoj — fama, li fondis 1922 la faman revuon «Literatura Mondo», li kontribuis al ties literaturo sub kashnomo Teo Melas, li verkis la libron «Modernaj Robinzonoj». Sed al pli novaj lia nomo estas tute nekonata.

Nun li do reaperas en nia literaturo. Per stranga libro.

Jam multajn librojn mi legis pri la terurajhoj dum la lasta milito — de la kortusha Taglibro de Anne Frank ghis la plej detale priskribantaj el la germanaj koncentrejoj. Tiu ĉi estas tute alia.

La aŭtoro estas judo. Komprenante la situacion de la judoj, li faras sian eblon sin kashi, kaj ankaŭ provas helpi aliajn savighi. Kaj jen lia rakonto pri tiuj malhelaj tagoj. Per sekaj, senemociaj vortoj li rakontas. Ech kiam li rakontas pri plej fiaj teruragaj kaj hombuchadoj oni legas sen animpremo kaj angoro. Ni estas rigardantoj, li estas chichero — kaj la libro estas kvazau muzeo, en kiu estas montrata tiu tempo kaj tiuj agoj. Kelkloke oni emas rideti, tamen tuj la aŭtoro montras la nedeccon de la rido. Char ne estas cirko, vere estas maskerado — sed chirkau la morto.

Oni renkontas falsistojn, oni vidas tiujn, kiuj nur deziras mongajnon — ech se tiu kondukas alian en la morton.

Kaj jen kaj jen la masakrado. Lau Danubo kushas la kadavroj chiumatene. La sagokruculoj serchas sian ghojon en la doloro de aliaj homoj. Tamen, je formeto de la libro, oni ne sidas kun koro plena da malamo. Kial? Simple char la aŭtoro ne malamas.

Estas homa dokumento. Oni povas per ghi lerni multon pri la homa naturo. Precipe, ke la homa naturo kashas abismojn da malbono.

Stafeto-libro. Jen stampo de kvalito. Tamen oni povas ĉi tiun fojon miri, ke estas tiom da preseraroj. Ech inter la majuskloj de la chapitrotitolo pagho 207. La «Vortglosoj» p 24 klarigas la multegajn fremdlingvajn esprimojn, kaj la Postnoto iom pritraktas la strangecojn de la stilo.

HAR.

China komunismo

Jam plurfoje antaue ni en recenzoj atentighis pri la vasta uzo de Esperanto en la china politika propagando. Denove atingis nin aro de libretoj, broŝuroj kaj pamfletoj, kiuj vigle respregulas la evoluon de la politika vivo.

En «Pri la pseudokomunismo de Hhrushchov» oni asertas, ke «Pro la reviziismo de Hhrushchov, la unua socialisma shtato en la mondo . . . nun alfrontas senprecedencan dangheron de kapitalisma restarigho», kaj la pamfleto «Kial Hhrushchov falis» substrekas, ke «tio ĉi estas granda bono, bonego por la revolucia afero de la monda popolo.»

Norvega Kroniko

Festkunveno

26/11 1966 la klubo festis sian 50-jaran Jubileon en «Josefine». Partoprenis 51 personoj. Ĉe ĉiu manghilaro kushis ekzemplero de «Kronologia Historieto 1916—1966», ellaborita de John Berggreen, kaj de «Festkantoj», kompilita de Brynhild Østmo. La menuo konsistis el rostbovajo kun legomoj, glaciaĵo kaj kafo Mocca.

Starante la cheestantoj kantis «La Espero»n. La Kluba Kantgrupo salutis nin per «Bonvenon, amikoj», kantita kvarvoĉe. La vicprezidanto Otto Prytz faris bonvenparoladon, Johan Hammond Rosbach legis memverkitan prologon, la prezidanto de N.E.L. festparoladis kaj samtempe salutis de la ligo. La nuna klubo prez. John Berggreen salutis la pionirojn, kaj precipe la invititajn honorajn membrojn, samtempe donacante florbukedojn al ili, nome Aagot Sletterød

Chi tie en dek du punktoj la ĉinoj dokumentas liajn erarojn. sed la entuziasmo iom malaltighis en «Kommento pri la marta kunveno de Moskvo», ĉar «post lia falo (ili) . . . persistas en la reviziismo de Hhrushchov sen Hhrushchov, kaj . . . deziras degenerigi komunistajn partiojn en socialdemokratiajn partiojn.»

Tamen la ĉinoj ne nur atakas la sovjet-rusan komunismon. Ili ankaŭ eldonis esperantlingve tri libretojn verkitaĵoj de Mau Zedong: «Pri Kontraŭdiro» (60-paĝa), «La ĉina revolucio kaj la komunistaj partio de Ĉinio» (62-paĝa) kaj «La aktuala situacio kaj nia politiko post la venko en la kontraŭ-japana rezistmilito» (30-paĝa). Tiuj tri verkoj — elektitaj el ĉina «Elektita verkaro» — enhavas fundamentajn erojn por kompreni la politikon de ĉinaj komunistaj gvidantoj. Vershajne aperos eĉ pli el la verkoj de Mau en Esperanto.

La plej granda libro tamen estas «Proletoj de ĉiuj landoj unuighu por oponi nian komunan malamikon» (360-paĝa). Shajnas, ke la komuna malamiko estas la diversmaniera pensado de komunistaj gvidantoj de la diversaj landoj. Tial la libro konsistas el gazetaj ĉefartikoloj kiuj pritraktas la «reviziismon» kaj ties gvidantojn -- Togliatti, Thorez, Dange kaj aliaj. R.

(kiu bedaŭrinde pro malsano ne povis cheesti, sed sendis telegramon), la unua klubo prezidanto Bjørn Ottesen, kaj Tharald Dybing. Post tio la Kantgrupo kantis saluton al la pioniroj. Poste, la tostmastro Astrid Mansrud donis la parolon el la gastoj kaj reprezentantoj de eksterurbaj kluboj, nome Itamar Even-Zohar el Israelo, Birger Reinertsen, kiu en la nomo de la Esperantoklubo en Kr.sand donacis al nia klubo belan stanan kandelignon, J. H. Rosbach en la nomo de «La Urso» en Sarpsborg, Sonja Jørgensen de Trondheim, kaj Lovise Bøe de la Laborista Esp. Klubo en Oslo. La prez. legis leteron ricevitajn de Mimi Jørgensen, la unua kasisto de nia klubo. Ŝi dankis pro la invito, sed pro malsano en la familio ŝi bedaŭris ne povi veni. Plue, ŝi skribis ke ŝi deziras fari ion por la klubo, kaj sendas kiel donacon kr. 500. Po unu reprezentanto de ĉiuj norvegaj esp.kluboj estis invititaj al la festeno, sed nur la supre menciitaj venis. Multaj el la aliaj sendis salutojn — la Esp.klubo en Løten kaj la Klubo de Fervojistaj Esp.istoj en Oslo sendis belajn florojn. — C. Støp-Bowitz en la nomo de N.E.L. transdonis la valoran 3-voluman libron de Prus «La Faraonoj» por la klubo biblioteko. — Bjørn Ottesen sprite kaj amuze dankis pro la mangho. Inter la diversaj eroj ni multe kantis laŭ akompano de C. Støp-Bowitz per tirharmoniko kaj Asbjørn Syslak per piano.

Ni forlasis la manghotablon kaj kolektiĝis en la apudaj salonoj. Asbjørn Syslak per piano ludis klasikan norvegan muzikon, kaj Kirsten Ek legis eltirajhojn de la unua numero (1941—42) de la klubo manskribita gazeto «La Vagabondo». — Bedaŭrinde la kantado sola de la kantistino Astrid Jacobsen ne okazis pro ŝia malsano.

La kulmina punkto de la vespero — laŭ mia opinio — estis la Ordena Promocio de «La Verda Pantoflo». Sub gvidado de la Ordena Majstro C. Støp-Bowitz — reghe vestita en skarлата mantelo kun ora krono sur la kapo kaj scepro en la mano — estis disdonataj ordenoj al diversaj meritplenaj membroj de la klubo: Aagot Sletterød ricevis la Grandan Krucon (kiun nur unu persono povas posedi samtempe), la gradon Oficiro de la 1-a grado ricevis Brynhild Østmo kaj Rolf Bugge-Paulsen, Oficiro de la 2-a grado ricevis Bjørn Ottesen kaj Harda Danielsen, Kavaliro de la 1-a grado Tharald Dybing kaj Ludvig Anjer, Kavaliro de la 2-a grado John Berggreen, Thor Magnus

Carlsen, Kirsten Ek, Kjell Gustavsen, Otto Koren kaj Kaare Myhr.

Post tio ni ghuis kafon kun Wales-kringo, kaj la festeno finiĝis per dancado kaj ludado, en tre gaja etoso.

En angulo de la manghosalono trovighis ekspozicio de «malnovajhoj», nome multaj fotoj de la diversaj epokoj de la klubo vivo, protokoloj, gazetoj kaj aliaj malnovaj dokumentoj. Tre interesa.

Je la 2-a horo la lastaj partoprenantoj adiaŭis kun la sento ke ili pasigis vere agrablan, interesan kaj richenhanan vesperon, kiun ili certe memoros longe en la estonteco.

La prezidanto John Berggreen, kiu estris la aranghojn, kunlabore kun la membroj de la klubo estraro, vere meritas dankon pro la tre sukcesplena Jubilea Festeno.

Raportis Harda Danielsen.

ORDINARAJ KUNVENOJ

Klubo Esperantista en Oslo.

3/11. 66. La programo estis dedichita al U.N. okaze de la Tago de U.N. 24/10, kaj UNESCO kiu la 4/11 festos sian 20-jaran naskightagon. C. Støp-Bowitz faris la paroladon. Ĉar la antaŭmilita Ligo de Nacioj fiaskis, oni decidis formi novan organizadon — la Unuighintajn Naciojn, kiu ekfunkciis la 24/10. 45. Norvegujo alighis 16/11. 45. Nun U.N. havas multe pli ol 100 shtatojn-membrojn. La pakto difinas la celon: forigi ĉiun minacon kontraŭ la paco. U.N. havas vicon da aliaj suborganizajhoj, inter ili UNESCO, kiu laboras por paca kunlaborado sur kultura nivelo. Ghi fondighis 4/11. 66, komence kun 20 membroj kaj havas nun 120 membroshatojn. La Ghenerala Konferenco de UNESCO 10/12. 54 rekonis la rezultojn atingitajn per Esperanto sur la kampo de internaciaj intelektaj intershanghoj kaj por la proksimigo de la popoloj de la mondo, kaj donis al U.E.A. konsultan staton.

Kirsten Ek tre bele kaj klare citis la poemon «La Turo Babilona», verkitan de M. Goldberg, kaj tradukitan en Esperanton de d-ro Zamenhof.

La lasta programero estis la kolorfilmo de la FIAT-fabrika «Fiat 850». Kjell Berggreen funkcigis la aparaton.

Cheestis 38 membroj kaj unu gasto, nome Ladislav Blecha el Liberec, Ĉehhoslovakujo, kiu salutis nin. La prez. dankis kaj petis lin transdoni niajn salutojn al lia klubo.

21/10. 66. Post bonvendeziroj de la prez. John Berggreen, li donis la parolon al Otto

Prytz, kiu per brajle skribita manuskripto legis «La Vagabondo», redaktitan de li mem kaj Thor Magnus Carlsen. La gazeto estis tre richenhava, interesa kaj amuza. Ghi entenis temojn pri naturscienco, sporto k.t.p. — ankaŭ poemon de Julio Baghy.

John Berggreen prizorgis la 10-minutan lingvan instruadon. La temo estis la norvega vorto «ta» kaj li donis 46 diversajn tradukojn en Esperanton. Kelkaj membroj ankaŭ sugestis pliajn tradukeblecojn.

Cheestis 19 membroj kaj unu gasto, nome Johan Matland el Sauda. Li salutis la cheestantojn kaj la prezidanto dankis.

Raportis Harda Danielsen.

1/12. 66. La Kluba Kantgrupo kantis tute novan kanton «Zamenhofa Vespero». Teksto kaj muziko estas de la nederlandanoj Cé. Roelofs resp. Lou Visser. Asbjørn Syslak aranghis la muzikon por 2 voĉoj kaj akompanis per piano.

Okaze de la ZAMENHOF-TAGO C. Støp-Bowitz, vicdirektoro de «Internacia Instituto por Oficialigo de Esperanto», prelegis pri «De Doktoro Esperanto al IOE». Li klarigis pri la evoluo de la varblaboro por la internacia lingvo de la elsendo de la unua broŝuro pri Esperanto en 1887 ghis hodiaŭ. Iom post iom la intereso kreskis, oni varbis kursanojn kaj tiuj, kiuj restis fidelaj, kreis la nunan esperantistaron. La kursoj estis la bazo de la movado. Sed kursoj ne sufichas, oni devas trovi ankaŭ aliajn metodojn por varbado. La jugoslava esperantisto Tibor Sekelj kune kun ĉiam kreskanta aro da kunlaborantoj per intensa agado volas kreis amasmovadon esperantistatan kaj iniciatis IOE. La intenco estas ataki la diversajn flankojn de la socio — komence la sporton, interesigi personojn ligitajn al turismo, ankaŭ la turistojn mem. La instituto ankaŭ eldonas gazeton, la «IOE GAZETO»n.

John Berggreen legis chapitron de la «FUNDAMENTA KRESTOMATIO».

La lasta ero do la programo estis divenkonkurso, kium gvidis C. Støp-Bowitz laŭ ideo de J. H. Rosbach, en formo de veto laŭ modelo de «Tipping», por helpi la ekonomion de «Norvega Esperantisto». Ĉar la nuna presisto chegis la preskontrakton, oni devas serĉi novan presejon -- certe pli multekostan, kaj pli da enspezoj estas nepre necesaj.

Ĉar estis la lasta kunveno antaŭ Krist-

nasko, la longa tablo estis bele ornamita per kristnasktuketoj kaj kandeloj.

Raportis Harda Danielsen.

La Urso, Sarpsborg, kunvenis 8/12. La prezidanto, J. Hammond Rosbach prelegis pri la granda renesanca skulptisto Donatello, kiu mortis en Firenze antaŭ 500 jaroj, la 13-an de decembro 1466. Post la prelego La Urso decidis transsendi al la Esperanto-klubo de Firenze 50 kronojn, kiujn oni liveru al la aŭtoritatoj, kiuj zorgos pri riparado de pentraĵoj, kiuj suferis pro la akvokatastrofo. Nia klubo ricevis dankan leteron de la firenca klubo, kiu rakontas, ke la klubo perdis sian bibliotekon, sian magnetofonon kaj la sonbendojn pro la katastrofo. Oni petas, ke ni sendu uzitajn poshtmarkojn, kiujn la italaj samideanoj volas vendi por havigi monon por aĉeti novajn magnetofonon kaj librojn. Tiuj, kiuj deziras helpi, povas sendi poshtmarkojn al La Urso, kiu zorgos por pluensendado.

Ni volas ankaŭ mencii, ke la taggazeto «Sarpn» en Sarpsborg tre aprobas nian helpon al Firenze, kaj en sia ekspedejo nun havas liston, por ke oni povu doni al la esperantista helpagado por arto en Firenze.

Saŭda Esperantoklubb.

16/12. 66. Unue s.ino. Elna Matland prelegetis pri la esperanta literaturo de la komenco en 1887 kaj ghis hodiaŭ. Estis tre interese sekvi la grandan evoluon, ni povas hodiaŭ kun granda fiero rigardi la ampleksan kolekton de bonaj valoraj libroj en la internacia lingvo.

La prez. instigis al la membroj aĉeti almenaŭ unu libron en ĉi tiu Tago de l'libro, kaj tre multaj sekvis la admonon. Oni ankaŭ fondis legorondon, kun 7 partoprenantoj, oni shanghos librojn en ĉiu konveno, do unufoje en la monato. Arthur Bjerke rakontis pri «Mia libro», li elektis la malgrandan modestan Shlosilon, kiu signifis tre multe por li. Olav Andersen ekhavis la taskon prezenti «Mia poemo» kaj bele deklamis por ni «La vojo» de Zamenhof, post kiam li unue prezentis la valoran enhavon en la poemo.

Post la kofopauzo estis konkurso, en kiu oni devis respondi demandojn koncerne la esperanto-literaturon, għin gajnis Norman Birkeli.

La kunveno estis tre bona kun varia programo.

Hans Kristiansen:

Portreto de lernanto

Septembra suno tra l'framo logas. kaj Else la kapon surbrake apogas.

Shi revas pri io — pri io sekreta, senlime grandega kaj senfine eteta.

L'okuloj distritaj sub frunto racia, lau sia naturo shi estas alia.

Lektoro prelegas laudeve, instrue, pri verbkonjugado lau kiel pli frue,

prelegas jam kvazau por propra vivo pri komparacio de la adjektivo.

Li milde minacas: neniam eraru en kiu kazo objekto staru.

Li premas freneze je l' mensaj citronoj kaj pafas neghblankajn paserojn per kanonoj.

Li premas de l' tempo la devo-esencon, el suko sunora en densan potencon.

Jes, super la sorcha sango-torento li levas abstraktan regul-firmamenton.

Kun pugnoj sangantaj li tondras de l' segho la pordon de vivo por osto de legħo.

Sed Else revadas pri io sekreta, senlime grandega kaj senfine eteta.

Ho ve.

Trad: EAH

La historio de la artefaritaj lingvoj

La historio de la artefaritaj lingvoj jam komencighis en la 17. jarcento. Dum la mezepoka tempo kaj ankoraŭ tre longe poste la homoj en Europo interkomprenighis preskau nur per la latina lingvo kun la eksterlandanoj. La latina lingvo estis en tiuchi epoko la «internacia lingvo» de la scienculoj kaj edukitaj klasoj. Ĉiuj verkoj kaj libroj estis skribitaj kaj presitaj en la latina lingvo, krome la nesciencaj nacilingvaj romanoj k.t.p. La edukitaj klasoj uzis tre ofte por la korespondado la latinan lingvon. En la 17. jarcento pligrandighis la naciaj interesoj de la popoloj. La scienculoj komencis pli kaj pli verki en la nacia lingvo. Tial reiris la uzo de la latina lingvo por la internaciaj rilatoj. Por la popolo estis la demando de la interkomprenigho ne tre grava, ĉar la homoj de la popolo malofte havis la eblecon vojaĝi eksterlanden kiel en la hodiaŭa tempo. Multaj homoj de la mezepoka tempo dumvive neniam elvenis el siaj urboj.

La unuan konatan malneton de artefarita lingvo varkis la franca filozofo kaj matematikisto DECARTES en la jaro 1629. En lia lingvo la vortoj estis konstruitaj per nombroj kaj signoj. Decartes havis la strangan opinion, ke lia lingvo estis lernebla en unu tago. Shajne li iam poste mem rimarkis sian eraron, ĉar li poste sian lingvon ne plu publikigis. La kunvivantoj de Decartes ne havis intereson por lia artefarita lingvo.

La skoto GEORGE DALGARNO verkis en la jaro 1661 sian artefaritan lingvon kun la titolo «Ars signorum oder Universal Character and Philosophical Language».

Dalgarno dispartigis ĉiujn vortojn kaj komprenajhojn en dek-sep cheffakoj. Vortoj kun la komenclitro N temis pri naturo, K = politiko k.t.p. Ĉiuj chef-fakoj estis plu partigita tielmaniere: Ki = kriminalo, Ku = milito kaj tiel plu.

Per pluraj partigitaj estighis la vortoj. La vorto «Nnm» esprimis = chevalo en la lingvo de Dalgarno. La gramatiko estis klare kaj facile konstruita. La kazon ne havis la artefarita lingvo de Dalgarno kaj la pluralo estis konstruita per diversaj sufiksoj. La lingvo de Dalgarno vere estis parolebla, sed ankaŭ ne por ĉiuj popoloj, kiel la ekzemplo pruvas: Dam semu Sava Nam tnn Nom = je la komenco verkis Dio chielon kaj teron. Lau Dalgarno oni povis lerni lian lingvon

en du semajnoj. Multaj de la kunvivantaj scienculoj de Dalgarno prosperigis lian lingvon. Lia lingvo estis certe genia kaj grava verko. Tamen divastighis lia lingvo nenie en Europo kaj verŝajne tial, ĉar mankis al Dalgarno la ebleco publikigi la lingvon al multe da homoj.

Preskau samtempe (1668) publikigis la angla episkopo, parlamentano kaj scienculo WILKINS sian propran lingvon. Li nomis għin: Essay towards a Real Character a Philosophical Language. Wilkins rimarkis, ke la matematikaj signoj kiel

$$\pi\varphi^{\circ}\lambda\Delta\delta\psi = +\beta\alpha^9$$

estas konstatataj en la tuta mondo, malgrau ke la scienculoj parolis multe da diversaj lingvoj. Do, kial ne konstrui artefaritan lingvon sur simila bazo kiel la matematika signoj, pripensis Wilkins. Krome sciis Wilkins iomete pri la china signo-lingvo.

Li sciis ankaŭ ke la ĉinoj provis per skribajhoj interkomprenighi, ankaŭ tiam, se ili parolis tute alian loko-lingvon.

Wilkins dispartigis ĉiujn vortojn en 40 fakoj kiel bestoj, korpaj agoj, spiritoj k.t.p. Ĉiuj fakoj estis plu partigitaj en diversaj partoj kun komencsignoj. La novajho estis, ke la artefarita lingvo de Wilkins nur esprimis la vortojn per skrib-signoj kaj ne per la latinaj literoj. La signoj de la vortoj estis simile kiel la ĉinaj skrib-signoj konstruitaj. La diversaj kazoj kaj pluraloj estis esprimataj per punktoj kaj strekoj. Wilkins konstruis la grandan nombron de 2 000 diversaj signoj. Krome verkis Wilkins sono-sistemon, per tiuchi la lingvo estis parolebla. Ĉiu fako havis certan silabon, same la subfakoj. Tiamaniere estis la vortoj por la parolado konstruitaj.

La kunvivantoj ne havis intereson por la artefarita lingvo de Wilkins, ĉar għi estis tro malfacile lernebla.

Post la malnetoj de Decartes, George Dalgarno kaj Wilkins ankoraŭ tre multe da artefaritaj lingvoj estis konstruitaj, kaj la plej multaj de ili estas tute ne uzeblaj por interkomprenigho de la popoloj.

La unua artefarita lingvo, kiu estis parolata en multe da landoj, estis la artefarita lingvo VOLAPÜK. 1880 verkis la germana pastro MARTIN SCHLEYER la lingvo Volapük. Volapük divastighis rapidege, kaj pruvis tiel, kiel nepre la homaro bezonas

internacian lingvon. Jam naŭ jaroj post la publikigo havis Volapük 200000 samideanojn en la tuta mondo. MARTIN SCHLEYER konstruis sur la bazo de la latina, germana kaj aliaj lingvoj. La signifon de la vortradiko oni povis shanghi per antau-kaj post-silaboj. Virinaj homoj kaj bestoj ricevis la antauliterojn «ji». Ekzemplo: blod = frato, jiblod = fratino. Bedaurinde havis Volapük multe da eraroj. Unu de la plej grandaj eraroj estis, ke la esprimo de la vortoj ne chiam estis tre preciza. Por esprimi la vorton vespo, oni devis fari jenan konstruajhon: Lu = fi, bien = bieno, Lubien = fibieno = vespo. Multaj aliaj vortoj oni devis same senprecize konstrui. Malbone estis ankaŭ, ke Volapük havis la literojn ä, ö, ü. Tiuj-chi literoj estas por tre multe da popoloj tre malfacile paroleblaj.

Kiam ekzemplo la komencon de la pregho «patro nia» en la lingvo Volapük: O fat obas, kel binol in süls, paisaludomös mem ola. Komonöd monargan ola. Jenomös vil alik, as in sü, i sul tal.

En la jaro 1889 okazis en Parizo la 3a mondkongreso de Volapük. Dum tiu kongreso proponis la Volapükanoj la plibonigon de Volapük. Sed la verkisto de Volapük estis kontraŭ la plibonigo de Volapük. Li diris, ke Volapük estu la propro verko de li kaj neniu rajtas modifi ion en ghi. Post tiu-chi kongreso mortis tre baldaŭ la Volapük-movado, kaj multaj Volapükanoj estighis Esperantistoj.

Pri la vera internacia lingvo, ESPERANTO, kiun d-ro Zamenhof preskau samtempe kiel Volapük verkis, mi ne devas raportti, char la esperantistoj certe konas la historion de Esperanto.

Post la genia verko de d-ro Zamenhof estis ankoraŭ kelkaj artefaritaj lingvoj verkitaj kaj chiuj estis pli au malpli simile konstruitaj kiel Esperanto, escepte de Interlingua kaj Basic English, kiuj havas alian lingvosistemon.

Ne unu de la artefaritaj lingvoj post Esperanto atingis la disvastigon kaj lingvokvaliton kiel Esperanto. La plej konataj artefaritaj lingvoj post Esperanto estas: Ido, Esperantido, Occidental, Novial, Romanol, Interlingua kaj Basic English. La plej multaj de tiuj-chi lingvoj nur vivas kiel malneto, kaj la resto preskau ne havas samideanojn. Jen kelkaj ekzemploj de artefaritaj lingvoj post Esperanto:

INTERLINGUA

En la jaro 1903 publikigis la itala matematikisto GIUSEPPE PEANO la artefaritan lingvon Interlingua, kiu estis verkita sur la bazo de la simpligo de la latina lingvo. La malavantagho de Interlingua estas, ke Interlingua havas tro multe da vortoj, kiuj estis por ekstereuropanoj tro malfacile elparolblaj. Ekzemplo de Interlingua: Televisione au transmissione de imagines ad distantia, es ultimo applicatione de undas electrico.

Novial

1928 publikigis OTTO JESPERSEN sian lingvon NOVIAL: La baza konstruo estis simile kiel Esperanto, sed la malavantagho estas, ke la signifo de la sufiksoj estas treege malpreciza. Sufikso estas por adago, alia sufikso por la rezulto de io agado, kaj la tria sufikso estas por la agado, sed inter agadmaniero kaj rezulto estas diferenco. Tiu lingvo estis tiel malfacile lernebla, ke ghi certe ne estus bone uzebla kiel internacia lingvo. Ankoraŭ ekzemplo de la artefarita lingvo NOVIAL: Un amiko de mi kel had studia spesimalim okulali kirurgia, examinad in un vespere mem vidpovo e informad me ke totim non interessant a lo pro ke lum esed.

BASIC ENGLISH

La artefarita lingvo BASIC ENGLISH estas la verko de la anglo C. K. ODGENS. Basic English estas konstruita sur la bazo de la simpligo de la angla lingvo. Basic English nur havas entute 850 vortojn, kiuj lau la opinio de Odgens suficas. En la vortaro de BASIC ENGLISH mankas la vortoj por multaj gravaj objektoj. Oni devas dum la uzo de Basic English klarigi la vortojn per chirkaufragoj. Tielmaniere oni ver-shajne devas klarigi la vorto «BEEFSTEAK» (angla) tielmaniere: Pezo de la dorso de rostita virbovo. Kiel oni povis tielmaniere traduki romanojn, sciencajn au poemajn verkojn?

Kiel finvorto mi diras al chiuj, kiuj planas verki denove ion artefaritan lingvon! Shparu vian laboron por konstrui internacian lingvon, sed lernu pli bone ESPERANTON, la vere internacian lingvon. Esperanto estas kaj restas la plej bona solvo de la internacia lingvoproblemo.

Ulrich Heinemann,
Koblentz.

Korespondu!

30-jara teknologo (en shipkonstruejo) deziras korespondi kun genorvegoj. Interesoj: esperantajhoj, poshtmarkoj, bildkardtoj. S.ro Stanislaw Czesnowicz, P. O. Box 13, *Gdynia-2*, Polujo.

35-jara mashinkompostisto deziras korespondi pri chiuj temoj. S.ro Jaroslav Mouzek, Gensovská 14, *Praba 6* — Dejvice, Chehoslovakujo.

45-jara kartografiisto deziras korespondi kun norvegoj. S.ro Thomas Strellich, 2824 Gill Avenue, *Bakersfield*, California, 93 306, Usono.

Mezagha instruistino pri geografio deziras korespondi kaj intershanghi poshtkartojn, diafilmojn. S.ino Róza Halász, *Tápiószéle*, AH iskola, Hungarujo.

21-jara oficistino tre deziras akiri norvegan korespond-amikon por intershanghi bildkartojn kaj poste librojn, k.t.p. F.ino Milusha Sovová, Na zákopé 47, *Olomouc 9*, Chehoslovakujo.

Mi tre deziras intershanghi poshtkartojn kun norvegoj. S.ro Miguel Roig, c/ Pablo Piferer No 74-1-3a, *Badalona* (Bar-na), Hispanujo.

25-jara fraulo deziras korespondi kun norvegaj gefrauloj. S.ro Elisio Rosa. Caixa Postal 5888, *Sao Paulo*, Brazilo.

Mi tre deziras norvegan korespond-amikon. S.ro Václav Braun, *Hradec Králové III*, SNP 605, Chehoslovakujo.

35-jara min-ingeniero, interesighanta pri shako, poshtkartoj kaj aliaj temoj, deziras korespondi kun norvegaj esperantistoj. S.ro Oleg N. Zozulja, str. Komsomola 49, logh. 7, *Gukovo 9*, U.S.S.R.

Pravcho Dimov, Trakja 10, *Gabrovo*, Bulgario, kaj Petko Totev Petkov, str. Skobeljevskva 30 ap.20, *Gabrovo*, Bulgario, dez. kor. pri chiuj temoj kaj intershanghi bildkartojn.

28-jara hungara poshtoficisto deziras korespondi. Interesoj: fremdaj lingvoj, korespondado, literaturo, historio, geografio, religio,

muziko, poshtmarkoj, koloraj bildkartoj, landkartoj, koloraj revuoj S.ro. Stefano Molnar, Malinowski ut. 36, *Kisujscállás*, Hungarujo.

29-jara hungaro deziras korespondi per bildkartoj. Balázs András, *Székesfehérvár*, Uttörö u. 8. Hungarujo.

15-jara knabo deziras korespondi, intershanghi bildkartojn kaj poshtmarkojn kaj ligi amikecon kun norvegaj esperantistoj. Pshenichnikov Valerij, str. K. Libknehht 14/2, 1. 33, u. *Hbmelnickij*, U.S.S.R. - Ukrainio.

Juna, gaja knabo deziras korespondi. Mi kolektas poshtmarkojn kaj poshtkartojn, interesighas pri filmo, libroj, naturo kaj moderna muziko. Czestaw Miriko, ul. Kempna 31/1, Gdansk 8, Polujo.

Tre deziras korespondi kun norvegaj samideanoj: s.ino Maria Genis, Ctra. de Llineás 5, *San Antonio de Vilamajor* (Barcelona), Hispanujo.

37-jara edzo deziras intershanghi bildkartojn de kinoaktorinoj kaj de kosmonautoj kaj ankaŭ poshtmarkojn kun samideanoj de Norvegujo. Jurij Moiseev, Fediko 5/2, kv. 123, *Kishinev*, Moldavio, U.S.S.R.

Eble iu el vi volus korespondi kun polino, instruistino en mezlernejo, kiu instruas la polan literaturon kaj interesighas pri la instruado, edukado kaj literaturo. Mia adreso: Irena Missiuoro, Koshciuszki 81/10, *Olsztyn*, Polujo.

Mi estas 42-jara librotenistino, komencantino, kiu deziras korespondi per simplaj vortoj. Mi kolektas poshtkartojn kaj modrevuojn. S.ino Ilona Daróczy, Erzsébet-utca 27, *Budapest IV* (Ujpest), Hungarujo.

Mi deziras korespondi kun norvegoj. Boril Josef, Prazská 9, *Hradec Králové IV*, Chehoslovakujo.

Du rumanaj esperantistoj demandas chu iu samideano bonvolus pagi por ili abonon de Norvega Esperantisto donace. Oni ja ne povas sendi monon el Rumanujo, sed oni volonte rekompencus per rumanaj poshtmarkoj. Bonvolu turni vin al N.E.L.

